

## Koncepto de interlingvistiko

La termino "interlingvistiko" devenas de la indiko *interlingua*, en la senco de "internacia helplingvo". Ĝin uzis itala matematikisto-logikisto **Giuseppe Peano** la 27-an de aŭgusto 1903 en sia artikolo "De latino sine flexione" pri simpligo de la latina lingvo por internacia uzo. La vorton li kreis unue en la formo *inter-lingua* (kun ligo-streko) kiel ĝeneralan terminon por lingvokonstruaĵoj, kiuj faciligu aŭ entute ebligu komunikadon inter personoj kun malsamaj denaskaj lingvoj. Peano poste iĝis direktoro de organizaĵo alinomita en 1910 al "Academia pro Interlingua", al kies membroj apartenis ankaŭ belga stenografo **Jules Meysmans**.

Meysmans publikigis en 1911 en sia revuo « *Lingua internationale* » artikolon "Nova scienco" (*Une science nouvelle*) proponante nomi "interlingvistiko" (*interlinguistique*) (interlingvistike) sciencon, kiu esplorus naturajn leĝojn de formado de helplingvoj. Unuflanke – li diras – la ideala internacia helplingvo ankoraŭ estas nura projekto kaj kiel tia ĝi ne estas objektive (science) observebla fenomeno. Sed aliflanke, ekzistas jam aro da helplingvoj, kiuj ekestis naturmaniere – principe ĉiuj parolantoj de diversaj dialektoj jam estas uzantaj la komunan etnolingvon en la rolo de lingvo helpa. Ekzistas jam metodoj, kiel priskribi kaj esplori tiujn ĉi ekzistantajn komunajn lingvojn, tial interlingvistiko povus okupiĝi ankaŭ pri aliaj helplingvoj, ekestantaj laŭ analogiaj lingvistikaj principoj, kaj uzi jam konatajn kaj pruvitajn metodojn. La nova scienco povus respondi al ĵus diskutataj demandoj ekzemple rilate homogenecon aŭ heterogenecon de la vortprovizo, striktan regulecon de gramatiko k. s., ĉu la helplingvo estu verko de unuopulo aŭ de kolektivo, ĉu ĝi ekestu laŭ donitaj reguloj aŭ sen preskribita sistemo ktp.. Resume, Meysmans opinias, ke la samaj konstruprincipoj /-leĝoj validas por la ekzistantaj (normigitaj) etnolingvoj kaj por konstruotaj helplingvoj, kio sekve pravigas lingvistojn okupiĝi pri ili.

Meysmans (kaj liaj kolegoj en Academia pro Interlingua) komence de la 20-a jc. do sentis bezonon de aparta scienco por okupiĝi pri fenomeno jam delonge ekzistanta, unuflanke dum la normigo de etnolingvoj, aliflanke kiel artefarita kreado de lingvoj. Klopodoj konstrui *artefaritan* lingvon (sub nomoj kiel "universala", "tutmonda", "filozofia", "helpa", "internacia" ktp., esprimantaj celon de la konstruo), do, esence, lingvokonstruado kaj lingvoplanado ekzistis jam ekde antikva epoko kaj floris dum renesanco, sed ne ligite ekskluzive kun lingvistiko aŭ eĉ kun aparta scienco kiel interlingvistiko. Ĝi ekzistis kiel parto de filozofiaj, filologiaj, klerigaj kaj similaj esplorkampoj kaj intensiĝis en la 19-a jc.. Artefaritecon en lingvokonstruado oni komencis serioze esplori precipe rilate al Volapük, la unua pli vaste funkcia interlingvo kreita en 1879, kies akademio estis senpera antaŭulo de Academia pro Interlingua.

Post Esperanto kaj ties reformproponoj aperis kelkaj gravaj lingvoprojektoj en la unua triono de la 20-a jc. Tiam finfine ekfloris sistema intereso de profesiaj lingvistoj, inter ili de mondkonata dana fonetikisto kaj anglisto **Otto Jespersen**, kiu, kvazaŭ kiel reago al la postulo de Meysmans, pledis por interlingvistiko kiel *memstara lingvistika disciplino*. Jen komenco de lia artikolo "A new science: Interlinguistics" (1930/31): "*A new science is developing, Interlinguistics - that branch of the science of language which deals with the structure and basic ideas of all languages with the view to the establishing of a norm for interlanguages, i.e. auxiliary languages destined for oral and written use between people who cannot make themselves understood by means of their mother tongues. Interlinguists contend, and to my mind, rightly, that there is here a field that can be treated according to scientific methods and which is of the utmost importance to civilized mankind to see thus treated in order to obtain a satisfactory solution to a really harassing problem.*" (Traduko: Nova scienco estas evoluanta:

interlingvistiko – tiu parto de la lingvoscienco kiu okupiĝas pri strukturo kaj bazaj ideoj de ĉiuj lingvoj kun la celo establi normon por interlingvoj, t. e. helplingvoj destinitaj por parola kaj skriba uzo inter homoj kiuj ne povas interkompreniĝi pere de siaj gepatraj lingvoj. Interlingvistoj asertas, kaj laŭ mia opinio prave, ke ĉi tie troviĝas laborkampo kiun oni povas trakti per sciencaj metodoj, kaj krome ege gravas por la civilizita homaro, ke oni zorgu pri tia traktado por akiri kontentigan solvon de vere urĝa problemo.) La artikolo, kiu samtempe emfazis bezonon de internacia helplingvo, ekestis kiel reago al la konferenco okazinta en 1930 en Ĝenevo. IALA (International Auxiliary Language Association – Internacia Helplingva Asocio, fondita 1924 en Novjorko), lasis prijuĝi projektojn Esperanto, Ido, Nov-Esperanto, Latino sine flexione, Occidental kaj Novial, sen trovi konvinkan solvon. En la deklaro de la konferenco estis esprimita neceso de kunlaboro inter lingvistoj (reprezentantoj de kompara lingvistiko kaj lingvofilozofio) kaj interlingvistoj por krei akcepteblan internacian helplingvon. La artikolo de Jespersen finiĝas per vortoj: *"The advent of a simple and adequate International Auxiliary Language will prove a boon to philologists, philosophers, medical men, scientists, technicians, politicians, merchants, tourists - in short, to everybody whose horizon is not limited to his native country."* (Traduko: La ekesto de simpla kaj adekvata internacia helplingvo montriĝos kiel beno por filologoj, filozofoj, medicinistoj, sciencistoj, teknikistoj, politikistoj, komercistoj, turistoj – esence por ĉiu, kies horizonto ne estas limigita al la propra naskiĝlando). La unua frazo de tiu ĉi artikolo estas kutime citata kiel la unua difino de interlingvistiko, do la scienco okupiĝanta pri interlingvoj (pluralo) aŭ helplingvoj (pluralo), sed, kiel Jespersen mem koncedis je la fino, oni daŭre estis serĉantaj *unu* idealan helplingvon. Tamen, jam post la komparo de la esploritaj lingvoprojektoj montriĝis, ke praktike ne eblas evoluigi sistemon, kiu kunigus avantaĝojn de ĉiuj (kiel rimarkis jam en la tridekaj jaroj ekz. William E. Collinson).

Tion komentis i.a. nederlanda latinisto Wilhelmus J. A. Manders dudekon da jaroj poste (1950) en sia verko "Interlingvistiko kaj esperantologio", dirante, ke Jespersen estis trafe karakterizinta la celon kaj metodon de la interlingvistiko, sed evidente ankoraŭ ne ekzistas kontentiga solvo. Manders skribas: "La celado de la interlingvistoj krei kaj enkonduki lingvon neriproĉeblan ne povas esti antipatia al ni. Sed ni estas skeptikaj pri la demando ĉu estas eble konstrui lingvon kiu kontentigos ne nur siajn aŭtoron aŭ iujn grupojn (okcidentajn, sicenculojn), sed ĉiujn klasojn kaj ĉiujn naciojn. Kaj eĉ pli dubinda ŝajnas al ni la ebleco ĝenerale akceptigi tiun lingvon, kiom ajn perfekta ĝi estu." Manders do vidis en interlingvistiko tiun branĉon de la lingvoscienco, kiu ne nur starigu normojn por interlingvoj, sed ĉefe celu trovi la plej kontentigan solvon de la internacilingva problemo. Krome li menciis, ke la solvo de la problemo dependas de multaj faktoroj, inter kiuj la lingvistikaj ne nepre estas la plej decidaj.

Ambaŭ ĵus prezentiaj konceptoj de interlingvistiko vidis en ĝi sciencon, kiu ĉefe okupiĝu pri leĝoj kaj normoj por *konstrui* la postulatan interlingvon. Alia membro de Academia pro Interlingua, hungara historiisto **Dénes Szilágyi**, varbis ekde 1928 por pli larĝa koncepto de la fako inklude de sistema aŭ ĝenerala interlingvistiko, kiu devus ampleksi ankaŭ *historian kaj komparan studadon* de interlingvoj kaj tiel vekti atentemon eĉ de tiuj sciencistoj, kiuj opinias la celon starigi mondan helplingvon utopia. Li fondis "Officium Interlinguisticum Budapestiense" kaj kunordigis terminologian komisionon de sep fakaj aŭtoritatoj: Giuseppe Peano, Otto Jespersen, Walter Borgius, Ernst Drexler, Edward P. Foster, Giacomo Mezzanin kaj Edgar de Wahl. La laborrezultojn publikigis Szilágyi la 15-an de marto 1931 sub la titolo *Versus Interlinguistica* (survoje al interlingvistiko), kies unua parto nomiĝas "Principoj de ĝenerala interlingvistiko" (Principios de interlinguistica generale, pritraktanta 23 principojn) kaj la dua parto estas skizo de terminologia vortaro konsistanta el 69 vortartikoloj. Tie oni

legas, ke germana idisto Josef Weisbart proponis la serion "interlingvo – interlingvisto – interlingvistiko". "Interlingvisto estas tiu, kiu okupiĝas pri speciala studado de interlingvoj el ĝenerala aŭ normiga vidpunktoj." Post Meysmans, kiu proklamis aŭtonomion de normiga interlingvistiko (sen eksplicite nomi ĝin tia), romanisto Albert Léon Guérard en 1922 nomis ĝin "aplikata" aŭ "konstrua" kaj Wieslaw Jezierski en 1927 proponis terminon "normiga interlingvistiko", ĉar jam pli frue hungara lingvisto Fülöp Kaiblinger estis uzinta vorton "konstrua interlingvistiko" rilate al okupiĝo de glotologoj pri etnolingvoj (en sia libro "Alkotó nyelvtudomány" [krea lingvistiko], 1912, li postulis transiron de historia kaj psikologia koncepto de lingvistiko al la konstrua, aktiva aliro.)

Szilágyi vidas interlingvistikon kiel sistemon de teorioj kaj teknikoj, servantaj al produktado de interlingvoj, sed li esence distingas interlingvistikon *normigan* desde interlingvistiko *ĝenerala* por historia kaj kompara studoj de interlingvoj. Tiu ĉi havas gravan taskon prijuĝi, ĉu la proponata interlingvo kapablas ricevi socian akcepton, ĉu ĝi sekvas la linion de ĝenerala evoluo de interlingvoj, ĉu ĝi harmonias kun la koncerna epoko kaj estas aktuala.

Alia grava rimarko estas dediĉita al la *interdisciplineco* de interlingvistiko (Szilágyi uzas terminon "limitofio"). La interhoma komunikado dependas de multaj faktoroj, tial nek interlingvistiko povas ekzisti sen kunlaboro kun aliaj disciplinoj kiel ekzemple – krom lingvistiko mem – sociologio kaj psikologio. Interlingvoj havas krom tio apartajn speciafajn trajtojn, kun elementoj sciencaj, religiaj, praktikaj, politikaj, ekonomiaj, eĉ patologiaj kaj aliaj, kiujn oni devas prikonsideri.

La tria baza punkto de "Versus interlinguistica" estas *terminologio*. Szilágyi konsciiĝis, ke la scienco bezonas unuecan fakan lingvon, por ke ne okazu miskomprenoj kaj paralelaj laboroj kun la samaj enhavoj sub diversaj nomoj. Li povis ellabori empirian terminologion surbaze de sia kolekto de faka materialo kaj konsultiĝo kun fakuloj. Bedaŭrinde, tiu ĉi grava punkto estas ĝis nun neglektata: kaj en la lingvokonstruado kaj en lingvopriskribado regas terminologia kaoso. Ekzemple, la enciklopedio de Albani-Buonarroti el la jaro 1994 e havas nur 9 terminojn komunajn kun la "Schedio encyclopaedico" de Szilágyi (academia interlinguistica, artificiale lingua, auxiliare lingua, grammatica rationale/univesale, interlingua, interlinguistica, naturalismo interlinguistico, pasigraphia, philosophica lingua). La terminologio de la 21-a jc. (vidu ekz. enciklopedion "Made-up languages" de Rogers 2011) estas eĉ pli konfuza.

La menciita konferenco en Ĝenevo (1930), farinte komparan analizon de tiam aktualaj internaciaj helplingvoj, alproksimigis la interlingvistikon al *lingvotipologio kaj lingvokomparado*: usonaj lingvistoj Edward Sapir, Maurice Swadesh kaj William Edward Collinson ene de IALA en tridekaj-kvardekaj jaroj de la 20-a jc. okupiĝis pri komparoj de eŭropaj lingvoj por trovi ilian komunan prototipan bazon. Internaciismoj en eŭropaj lingvoj iĝis substancia esploroobjekto kiel konstrumaterialo por internacia lingvo. IALA publikigis ĝin en 1951 sub la Peano-nomo "Interlingua", tial estas interlingvistiko foje komprenata tro simple nur lige al tiu ĉi konkreta planlingvo. (La afero eĉ pli komplikiĝis en 1949, kiam alia internacia lingvo, Occidental, alinomiĝis al "Interlingue", krome nun povas la termino "interlingvo" esti uzata por pivotlingvoj/pontolingvoj en maŝintradukado kaj eĉ por trapasa strukturo dum lernado de fremdlingvoj.)

Tamen, la termino mem proponas du esencajn eblojn de interpretado: la interlingv-[ist]-iko, t. e. scienco pri interlingvoj (fakte, eĉ purecaj terminoj "lingviko" kaj "interlingviko"

ekzistas en Esperanto) estas la koncepto originala kaj la plej ofta. La dua eblo, interlingvistiko, celanta klarigi la komunikajn rilatojn "inter lingvoj", estas pli proksima al lingvokomparado, kiun – kiel IALA aludis – la interlingvistiko jes ja enhavas kiel implicitan parton, sed ne limiĝas nur al tiu.

Tiurilate, la broŝuro "Interlingvistiko. Skizo de nova lingvoscienco" (Interlinguistik. Umriss einer neuen Sprachwissenschaft) de aŭstra romanisto Mario Wandruszka el 1971 komprenas sub „interlingvistiko“ eksplicite nur kontrastan/ komparan lingvistikon: "Linguistik der Mehrsprachigkeit, der Sprachmischungen und Mischsprachen, der Übersetzung und des Übersetzungsvergleichs, des Gesprächs zwischen den Sprachen in uns, die neue vergleichende Sprachwissenschaft, die noch ihren Namen sucht, das alles kann man zusammenfassen als Interlinguistik. Der Gegenstand der Interlinguistik ist die Mehrsprachigkeit des Menschen." (Lingvistiko de plurlingveco, de lingvomiksaĵoj kaj mikslingvoj, de traduko kaj traduk-komparado, de dialogo de lingvoj en ni, la nova kompara lingvoscienco, kiu ankoraŭ serĉas sian nomon, tio ĉio estas resumebla kiel interlingvistiko. La objekto de interlingvistiko estas la plurlingveco de la homo.) La eksplicite limiga koncepto de Wandruszka, kvankam kun certa rilato al la interlingvistikaj laboroj de tridekaj ĝis kvindekaj jaroj de la 20-a jc., estas verdire soleca en la historio de interlingvistiko, kvankam ĝi foje reaperas ekz. sur interretaj paĝoj.

Laŭ aŭstra elektroteknikisto kaj terminologo **Eugen Wüster**, interlingvistiko ne nur konstatas, sed konscie influas la evoluon de la lingvo, kio validas precipe por etnolingvoj. En 1931 Wüster enkondukis la terminon "Plansprache" (*planlingvo*), per kiu li volis adekvate traduki en la Germanan la terminon "constructed language" uzitan de Jespersen por indiki la ekesto-manieron de internacia lingvo. Traduko "konstruierte Sprache" (konstruita lingvo), kiun estis uzinta la germana tradukisto de Jespersen, Siegfried Auerbach, ne plaĉis al Wüster. Li opiniis ĝin fakte sinonima kun "interlingvo" en ties originala senco, sed tiu ĉi jam estis tro firme ligita al Latino sine flexione de Peano (kaj poste al Interlingua de IALA) kaj malfacile tradukebla en la Germanan ("Zwischensprache" estus fidela, sed nekutima traduko de la termino). Sekve – rezonas Wüster – la "krea" (gestaltende) lingvoscienco povus nomiĝi "lingvoplanado" (Sprachplanung). La termino "Plansprache", t. e. "planlingvo" kiel sinonimo de "interlingvo" en sia senco kiel konscie laŭplane konstruita lingvo, estis relative rapide transprenita de germanaj kaj esperantistaj aŭtoroj kaj estas ĝis nun uzata. Aperis eĉ la termino *planlingvistiko* kaj samnoma esperantlingva revuo.

Evidente, Wüster ne antaŭvidis la specifan uzon de termino *lingvoplanado* (language planning) por la celoj de etnolingvoj. Tiun ĉi terminon, aperintan en 1944 en la libro "The loom of language" de Frederic Bodmer, uzis en 1957 Uriel Weinreich, estro de la jida katedro en Kolumbia Universitato en Novjorko, kiel titolon por sia seminario. Lingvoplanado tiam efektive koncernis ellaboron de jam ekzistanta(j) etnolingvo(j) aŭ dialektoj por nacia uzo, ekzemple de la novhebrea (ivrit) kaj norvega (nynorsk kaj bokmål). En tiu senco priskribas lingvoplanadon (ĝuste rilate al la norvega lingvo) norveg-usona skandinavisto Einar Haugen, en 1959, kiel aktivecon de ellaboro de normiga ortografio, gramatiko kaj vortprovizo de la lingvo por parola kaj sriba uzo de lingvokomunumo, kiu ankoraŭ ne estas homogena. Lingvoplanado inkludas normigan laboron de lingvaj akademioj kaj komitatoj, ĉiujn formojn de lingva kultivado kaj ĉiujn proponojn por lingvaj reformoj. Pluaj aliaj difinoj vidas lingvoplanadon kiel faktoron de lingva konduto de la komunumo (Thomas Thorburn, Robert L. Cooper) kaj kiel instrumenton por solvi lingvajn problemojn (Brian Weinstein, Jiří Neústupný k. a.).

En 1968, estona lingvisto **Valter Tauli** venis kun pli larĝa difino, kiu ampleksis internaciajn lingvojn: *Language planning is the methodical activity of regulating and improving existing languages or creating new common regional, national or international languages.* (Lingvoplanado estas metoda aktiveco de reguligo kaj plibonigo de ekzistantaj lingvoj aŭ kreado de novaj kunaj regionaj, naciaj aŭ internaciaj lingvoj.) En la koncerna libro, titolita "Enkonduko en la teorion de lingvoplanado" (Introduction to a theory of language planning) li dediĉis unu ĉapitron al interlingvistiko: *Interlinguistics can be defined as the science of international language (IL) planning, or more precisely, the branch of theory of language planning which investigates the principles, methods and tactics of IL planning. By IL is meant a universal language to be used as a means of communication by individuals belonging to different language communities.* (Interlingvistiko povas esti difinita kiel la scienco pri internacia lingvoplanado, aŭ pli precize, la branĉo de la teorio de lingvoplanado kiu esploras la principojn, metodojn kaj taktikojn de internacia lingvoplanado. Per internacia lingvo oni opinias universalan lingvon uzotan kiel rimedo de komunikado de individuoj apartenantaj al malsamaj lingvokomunumoj.) Klaras – diras Tauli – ke la nuna internacia komunikado per multaj oficialaj lingvoj estas malracia; la plej bona solvo estus, se ĉiu lernus la saman internacian lingvon kiel duan lingvon. Menciataj estas Esperanto, Ido, Occidental kaj Interlingua, tamen neniu el ili ŝajnas esti akceptebla, ĉar ili tro dependas de eŭropaj lingvomodeloj. Tauli emfazas, ke la internacia lingvo nepre devas esti ellaborita de kompetenta sicencista teamo – kaj li rekomendas uzi la Anglan en la intertempo. Kvankam Tauli principe malfermis la pordon de lingvoplanado al planlingvoj, la lingvoplanado estas hodiaŭ ĝenerale vidata kiel maniero solvi la lingvoproblemon de certa etna /nacia komunumo pere de taŭga lingva politiko (elekto de konvena dialekto, ellaboro de lingva normo), ĝi do prefere koncentriĝas al lingvopolitiko de etnaj, precipe minoritataj lingvoj.

La ĉefa tasko de interlingvistiko ĝis la duono de pasinta jarcento estis ligita al artefaritaj internaciaj helplingvoj (planlingvoj): ilia konstruado, analizo, komparo kaj elekto aŭ konstruo de la plej taŭga el ili. La aktiveco de IALA, gvidata de specialistoj, altiris intereson de multaj famaj lingvistoj tra la mondo, sed tiu intereso ekvelkis post la publikigo de Interlingua kaj fino de IALA en 1952. Tamen, nek Interlingua montriĝis esti la dezirata solvo. Ekestis duboj: kio nun okazu kun interlingvistiko? Ĉu ĝi daŭre serĉu idealan helplingvon? Ĉu ĝi pli okupiĝu pri etnolingvoj? Ĉu ĝi pli koncentriĝu al ĝeneralaĵoj aŭ ĉu ĝi male eĉ reduktiĝu al esperantologio? La interdisciplineco, antaŭvidita jam de Szilágyi, repostuliĝis ekz. en la verko de germana ekonomiisto **Artur Bormann**, fondinto de "Interlingvistika informa servo". En la artikolo "Bazaj trajtoj de interlingvistiko" (Grundzüge der Interlinguistik, 1959/60) li denove emfazis la bezonon de internacia kompreniĝo kaj komuna helplingvo, kiu povus esti aŭ etnolingvo aŭ konstruita lingvo (geschaffene Sprache). Li prezentis diversajn lingvistikajn, historiajn, organizajn kaj politikajn problemojn kaj aldonis, ke interlingvistiko, por esti plenalora scienca disciplino, ne povas resti limigita al ĝistiam funkcio, kaj proponis redifini ĝin kiel "scienca branĉo, kiu esploras *ĝenerale politikajn, kulturajn, sociologiajn kaj lingvistikajn problemojn* de komuna internacia lingvo, uzenda samkvante de ĉiuj homoj en internaciaj rilatoj." (Der Zweig der Wissenschaft, der die allgemein-politischen, kulturellen, soziologischen und linguistischen Fragen einer von allen Menschen in den internationalen Beziehungen gleichermaßen zu gebrauchenden gemeinsamen Sprache, der internationalen Sprache, erforscht.) Plue li proponis tri ĉefajn subbranĉojn de la fako: 1. *Ĝenerala interlingvistiko* esploru bazajn rilatojn inter lingvo, individuo kaj socio, deduktu el tiuj rilatoj la principojn por la selekto de internacia lingvo kaj observu ties efikojn politikan, kulturan, sociologian kaj ekonomian. 2. *Speciala interlingvistiko* esploru la rilaton inter la lingvoj internaciaj kaj naciaj, observante, kiel ili reciproke influas sin – do certasence kompara

interlingvistiko. 3. *Praktika* interlingvistiko okupiĝu pri la internacia lingvo mem, pri ĝiaj vortaro, gramatiko, stilistiko kaj plua evoluo.

En la sepdekaj jaroj de la 20-a jc. enhavis la koncepto de interlingvistiko tiom da diversaj aliroj, ke oni eĉ parolis pri "skoloj". Germana tradukisto Reinhard Haupenthal tradukis en 1976 dudekon da kernaj tekstoj pri interlingvistiko en la Germanan. Enkonduke al sia eldono de "Plansprachen" li diras, ke la plej trafa aserto pri interlingvistiko estas, ke tiu scienco ankoraŭ "ne trovis vojon al si mem". Antaŭ ol klare difini siajn celojn, ĝi jam komencis dividiĝi al diversaj skoloj, kiuj starigas al ĝi specialajn taskojn. Ĝenerale eblas diri, ke la enhavo de interlingvistiko estas komprenata ĉiam pli kaj pli amplekse.

Multflankajn konceptojn enhavis ekde siaj komencoj la sovetia interlingvistiko, ĉefe en la kampo de lingvopolitiko, sociolingvistiko, bilingvismo, multlingveco, kaj normigo de diversaj etnolingvoj (inklude de ellaboro aŭ ŝanĝo de skribsitemo) ĉar Sovetunio estis multnacia kaj multlingva ŝtato. Ekz. Aleksandr D. Ŝvejcer difinis lingvoplanadon kiel konscian influon sur la lingvaj ŝanĝojn. En la koncepto de interlingvistiko respeguliĝis ankaŭ moderna tekniko kaj teknologia evoluo. Portempe estis modernaj terminoj lingvoplanado, lingvokonstruado kaj lingvoingnierado. Petr Nikitiĉ Denisov konsideris interlingvistikon kiel antaŭkibernetikan modeligon. Olga Segeevna Achmanova en 1966 vidis la enhavon de interlingvistiko eĉ pli vaste: ĝi okupiĝu pri problemoj ligitaj kun kreado kaj funkciado de helplingvoj inkluzive de aŭtomataj inter-lingvoj, do principe kodoj por komunikado inter homo kaj maŝino. (Tartua slavisto Aleksandr Dimitreviĉ Duliĉenko eldonis detalan bibliografion "Sovetskaja interlingvistika" en 1983.)

Moskva lingvisto **Sergej Nikolajeviĉ Kuznecov** (1982/1987) vidas en interlingvistiko parton de lingvistiko, kiu okupiĝas pri problemaro de internacia komunikado. Ĝi pritraktu internaciajn kontaktojn kaj internacian lingvon kiel ilon de tiuj ĉi kontaktoj. Al la esplorkampo de interlingvistiko apartenu problemoj de multlingveco (kaŭzoj de ties ekesto, perspektivoj de evoluo ktp.), reciproka sininfluo de lingvoj, ekesto de internaciismoj (gramatikaj, leksikaj, semantikaj k. a.), planiteco de naciaj lingvoj, uzado de interretaj lingvoj kaj planlingvoj. Ne apartenu tien programlingvoj por komputiloj, etnolingvoj kiel identigiloj de sociaj grupoj ktp. Ĝenerala interlingvistiko interesiĝu pri monda lingvosituacio, pri multlingveco, pri internacia lingva komunikado, pri reciprokaj lingvaj influoj kaj internaciismoj, pri solvoj de internacia komunikadproblemo helpe de kaj naturaj lingvoj, kaj planlingvoj. Al *speciala* interlingvistiko apartenas teorioj de unuopaj planlingvoj, do ankaŭ esperantologio.

**István Szerdahelyi**, fondinto de la interlingvistika fakso ĉe la budapeŝta universitato, vidas interlingvistikon kiel branĉon de aplikita interlingvistiko kun siavice du subbranĉoj: lingvopolitiko kaj lingvoplanado, kun interfakaj rilatoj al sociolingvistiko, psikolingvistiko kaj lingvomodeligo. ("Enkonduko en la Interlingvistikon", 1979)

Modernaj konceptoj de interlingvistiko kontinue plivastigas ĝian intereskampon. Germanisto **Detlev Blanke** en 1985 difinis ĝin kiel *interdisciplinan lingvosciencan, esplorantan internacian lingvan komunikadon kun ĉiuj politikaj, ekonomiaj, lingvistikaj, informaciteoriaj kaj aliaj aspektoj*. Planlingvoj apartenas al la centra laborkampo de interlingvistiko. Parto de interlingvistiko estas ankaŭ esperantologio, scienco pri la plej granda funkcianta planlingvo. Tiu ĉi multflanka koncepto de interlingvistiko estas praktikata de la germana interlingvistika societo "Gesellschaft für Interlinguistik", kiun Blanke fondis en 1991 (<http://www.interlinguistik-gil.de>). La kompreno de interlingvistiko kiel scienco pri internacia

lingva komunikado kun ĉiuj ĝiaj aspektoj malfermas vastajn eblojn por esploro, prelegado kaj instruado en multaj kampoj. Tamen daŭre validas la principa ideo, ke interlingvistiko estas scienco pri interlingvoj. Sed, nur manpleno da internaciaj planlingvoj fakte *socié* funkciis aŭ funkcias, dum ĉirkaŭ milo da ili restis nerealiĝintaj *projektoj*.

En 2006 Blanke karakterizis kvar gravajn orientiĝojn (skolojn) de interlingvistiko: 1) scienco pri internaciaj helplingvoj (kaj etnolingvoj en la funkcio de "lingua franca", kaj planlingvoj), 2) scienco pri internacia komunikado, 3) kontrasta lingvistiko, lingvistiko de multlingveco, 4) scienco pri planlingvoj Interlingue kaj Interlingua. La scienco pri planlingvoj, do planlingvistiko, povas havi du alirojn, *konstruan* kaj *priskriban*.

En la naŭdekaj jaroj aperis postuloj, ke interlingvistiko okupiĝu ankaŭ pri *literaturo en planlingvoj*, ĝi do iĝu iuspeca filologio, simile kiel ekz. romanistiko kaj ĝermanistiko inkludas pristudon kaj de koncernaj lingvoj kaj de iliaj literaturoj. Tion montras ekzemple pola lingvistino **Alicja Sakaguchi** en sia habilitacia laboraĵo "Interlingvistiko: objekto, celoj, taskoj" (Interlinguistik: Gestand, Ziele, Aufgaben). Interlingvistiko, laŭ ŝia opinio, egalas al *planlingvistiko* (Plansprachenkunde) kaj ĝi estas lingvosciencia, eventuale ankaŭ literatursciencia disciplino por esplori planlingvojn kaj ties literaturojn. Ŝi pledas por koncentriĝo al la lingvosciencia flanko de interlingvistikaj problemoj kaj uzo de lingvistikaj metodoj, teorioj, hipotezoj, terminologioj ktp.. Aliaj aspektoj, kiel eble sociologiaj, filozofiaj, komunikadaj, politikaj k. s. ne estu "fremdaj" al la objekto, sed la ĥaraktero de interlingvistiko restu ĉiam esence lingvosciencia. Sakaguĉi plue parolas pri ĝenerala interlingvistiko, kiu tamen ne transpaŝu la lingvistikan limon kaj koncentriĝu al "esploro de planlingvoj, ties rilato al naturaj lingvoj kaj aliaj semiotikaj sistemoj." Speciala lingvistiko okupiĝu pri unuopaj planlingvoj kaj ties eventuala literaturo. Krome aperas novaj terminoj: interlingvistiko "*pura*" estas rekono de lingvaj donitaĵoj, interrilatoj kaj procedoj; interlingvistiko *aplikata* klopodas uzi rezultojn de ĝenerala lingvistiko kaj de la pura interlingvistiko por solvi taskojn de internacia kompreniĝa praktiko. Por studo de planlingvoj kaj serĉado de novaj, pli perfektaj modeloj de tiaj lingvoj estas bezonata *sciencia* interlingvistiko, emfazas Sakaguĉi.

Krom diversaj "propraj" fakaj objektoj, interlingvistiko pro sia interdisciplineco estas ligita al multaj aliaj sciencoj kaj kampoj, kiel didaktiko, pedagogio, sociologio, filozofio, dokumentadscienco, semiotiko, terminologio, sciencia komunikado, informadiko, logiko, kibernetiko, problemoj de artefarita inteligenteco kaj multaj aliaj, inklude de kulturo kaj religio. Unu el la preferataj intereskampoj de interlingvistoj estas la *lingvopolitiko* kun diversaj modeloj de internacia komunikado, kiuj laŭeble enplektu uzadon de planlingvo(j) kiel politike neutrala rimedo. Oni ofte forgesas la faktan, ke pri akcepto kaj disvastigo de internaciaj lingvoj decidas unuarange *nelingvistikaj faktoroj*, kiel socia prestiĝo de ties parolantoj kaj krom politika ankaŭ ekonomia kaj milita potenco de la koncernaj ŝtatoj. Ĉar la "grandaj" lingvoj angla, hispana, portugala, rusa kaj krome franca kaj germana estas eŭropdevenaj, oni ofte proponas enkonduki la plej uzatajn planlingvojn – same eŭropdevenajn – kiel *propedeŭtikon* por la lingvoinstruado. Aliflanke aperas kritikoj de tiu ĉi eŭropcentrismo.

Post la enkonduko de interreto en 1994 eksplode kreskas la nombro de novaj planlingvaj projektoj. Por ili stabiligis en interreto la termino *conlangs* (*constructed languages*); ilia subgrupo *auxlangs* (*auxiliary languages*) intencas helpi al internacia komunikado. Almenaŭ auxlangs laŭdifine apartenas al la studmaterialo de interlingvistiko, sed preskaŭ neniu el ili trapasis la projektan stadion, tial interlingvistoj ne emas serioze okupiĝi pri ili. Tio despli validas por aliaj tipoj de conlangs, kiuj estas tre ofte konstruataj nur por hobiaj celoj, ĉar la

problemo de internacia komunikado nun estas solvata favore al la angla lingvo. La demando estas, ĉu hodiaŭa interlingvistiko adaptiĝu al tiuj ĉi novaj faktoj aŭ ĉu ĝi daŭre fokusiĝu al esploro de eble taŭga(j) internacia(j) helplingvo(j).

Alia aktuala problemo estas serioza (mem)prezento de interlingvistiko. Koncernaj fakaj libroj kutime ne estas senpere alireblaj, tial la unua informfonto, ĝenerale uzata de nuntempa socio, estas ankaŭ en tiu ĉi kazo interreto kaj *Vikipedio*. Je la tago 2017-03-03 ekzistas Vikipedio en 295 lingvoj. 19 el ili (6%) enhavas la artikolon pri interlingvistiko kaj donas la koncernan difinon. (Laŭ grandeco: ukraina, Esperanta, germana, pola, angla, ĉeĥa, sveda, Interlingua, portugala, rusa, irlanda, itala, belrusa, katalana, hungara, nederlanda, hinda, Ido, franca.) Kvankam la artikoloj estas kontrolataj, i.a. de robotoj kaj laŭregule devas esti adaptitaj al la angla versio, ne ekzistas du identaj difinoj de interlingvistiko (krom la belrusa, laŭvorte tradukita el la rusa). Ili estas similaj, sed diferenciĝas en detaloj esprimantaj, kio apartenas/apartenu al la enhavo de interlingvistiko. La plej multaj difinoj kongruas pri tio, ke interlingvistiko estas parto de lingvistiko kaj ke al ĝiaj esplorobjektoj apartenu diversaj aspektoj de komunikado kaj helplingvoj/planlingvoj. Sed nur unuopaj difinoj mencias ekz. interdisciplinecon (katalana), lingvopolitikon (Esperanta, ĉeĥa, sveda), historion de planlingvoj (hungara) kaj literaturon en planlingvoj (pola). Laŭ ses vikipediaj difinoj interlingvistiko okupiĝu ankaŭ pri tradukoj, kodoj kaj pivotaj lingvoj. Jen la plej gravaj enhavnocioj de la vikipediaj difinoj (stato 2017-03-03):

<i>Gravaj enhavnocioj</i>	<i>Sumo da vikipedioj</i>
Parta disciplino de lingvistiko	10
Parto de kompara lingvistiko	1
Interdisciplineco	1
Diversaj aspektoj de komunikado	13
Helplingvoj/planlingvoj, ĉefe Esperanto	15
Etnolingvoj, lingua franca	5
Piĝinoj, kreoloj	4
Traduko, kodoj, tekniko	6
Optimumigo de komunikado, praktiko	6
Lingvopolitiko	3
Plurlingveco	1



Historio	1
Literaturo	1

La baza vikipedio (angla) donas la jenan karakteristikon: *Interlinguistics is the study of various aspects of linguistic communication between people who cannot make themselves understood by means of their different first languages. It is concerned with investigating how ethnic and auxiliary languages (lingua franca) work in such situations and with the possibilities of optimizing interlinguistic communication, for instance by use of international auxiliary languages, such as Esperanto or Interlingua. These are languages that are created by an intentional intellectual effort, usually with the aim of facilitating interlinguistic communication, but there are also interlanguages that have arisen spontaneously. These are called pidgin languages.* (Interlingvistiko estas la studo de diversaj aspektoj de lingva komunikado inter homoj kiuj ne povas interkompreniĝi pere de siaj diversaj unuaj lingvoj. Ĝi esploras, kiel etnaj kaj helpaj lingvoj (lingua franca) agas en tiaj situacioj kaj kiuj estas ebloj de optimumigo de interlingvistika komunikado, ekzemple per uzo de internaciaj helplingvoj tiaj kiel Esperanto aŭ Interlingua. Tiuj ĉi lingvoj estas kreataj per internacia intelekta strebo, kutime kun la celo faciligi interlingvistikan komunikadon, sed ekzistas ankaŭ interlingvoj kiuj ekestis spontanee. Tiuj estas nomataj piĝinaj lingvoj.) Laŭvortan tradukon de tiu ĉi difino enhavas la Ido-Vikipedio, la ceteraj vikipedioj plej ofte citas la unuan jespersenecan frazon kaj aldonas diversajn detalojn kaj ligojn (ligoj de la angla difino estas substrekitaj en la teksto).

Se oni serĉas la identecon kaj profesion de la aŭtoroj de tiuj ĉi vikipediaj artikoloj, nur malofte aperas nomoj de profesiaj lingvistoj, sed la aŭtoroj estas plej ofte informadikistoj, specialistoj pri komputiloj, ĉefokupaj vikipedianoj kaj studentoj de diversaj fakoj. Tiam ne estas surprize, ke temas precipe pri junaj homoj, por kiuj estas interretumado ĉiutaga afero. Ili memkompreneble havas bonajn konojn de la angla lingvo kaj facile (eĉ facilanime) transprenas terminojn kaj informojn ekzemple pere de sociaj retoj kiel Facebook kaj Twitter. Povas okazi, ke ili ne havas sufiĉan fakan orientiĝon kaj kritikajn spertojn pri interlingvistiko mem. Kontraste al tio, la maljuna generacio de interlingvistoj preferas resti fidela al empiriaj kaj literaturaj esploroj kaj opinias interreton inklude de Vikipedio neserioza kaj necitebla fonto.

Vidalvide al multaj entuziasmaj lingvokreantoj, kiuj disvastigas siajn conlangs per la reto, estas por nunaj interlingvistoj pli malfacile gajni intereson de spertaj profesiuloj, kompareble kun la interlingvistikaj pioniroj kiel Jespersen kaj IALA. La vasta spektro de eblaj interlingvistikaj kampoj estas unuflanke vidata kiel pliriĉigo de esplorkampo, sed aliflanke ankoraŭ ne regas unueco en ilia envicigo en la fakon: ĉu al ĝi fakte apartenu la lingvoplanado kaj lingvonormigo de etnaj lingvoj aŭ evoluo de piĝinoj, ĉu ĝi interesiĝu pri tradukado, kodoj kaj pivotaj lingvoj, ĉu eblas serioze okupiĝi per lingvoj kreitaj por fikciaj komunumoj ktp.. La respondoj dependas interalie de la profesia fono de unuopaj interlingvistoj, kiu povas vari de filologio kaj sociologio ĝis informadiko kaj perilsociologio. Dum la preciza difino de interlingvistiko kaj unueca opinio pri ties esplorkampo estas ankoraŭ serĉata, la ekzisto de universitatnivela interlingvistika studo estas pozitiva fakto, kiu nepre favoras al la evoluo de tiu ĉi centjara scienco.